# AMERIKA ESPERANTISTO

MAY, 1921



OFFICIAL ORGAN OF

THE ESPERANTO ASSOCIATION
OF NORTH AMERICA

Digitized by Google

Original from NEW YORK PUBLIC LIBRARY

# AMERIKA ESPERANTISTO

# OFFICIAL ORGAN of

# The Esperanto Association of North America, Inc.

a propaganda organization for the furtherance of the study and use of the International Auxiliary Language, Esperanto.

Yearly Memberships: Regular \$1.00: Contributing \$3.00: Sustaining \$10.00; Life Members \$100.

CO-EDITORS: NORMAN W. FROST

H. M. SCOTT

MRS. I. M. HORN

# CLUB DIRECTORY

This department is conducted solely for the benefit of our organized groups throughout the country. It furnishes a means of keeping in close touch with the work in other cities, for the exchange of ideas and helpful suggestions, and for the formation of valuable friendships in a united field of endeavor.

BERKELEY, CALIF.
Berkeleya Esperanta Rondo.—Classes Monday and Tuesday evenings at 8.00.—Meetings Thursday evenings at 2508 Vine St. Address Vinton Smith, 530 62nd St., Oakland, Calif.

OAKLAND, CALIF. Oakland Esperanta-Rondo; L. D. Stockton, Bibliotekisto, 420 15th St.

#### SAN FRANCISCO, CALIF.

San Francisco Esperanto Rondo; meets second Monday eve., 414 Mason St., Santa Clars Hall. F-ino Evelyn M. Rosher, 125a Beulah St. Kalifornia Esperantista Rondaro meets first Tuesday evenings, Room 121 Chronicle Bldg., San Francisco. M. D. Van Sloun, Secy., 946 Central Ave.

#### MONTREAL, CANADA.

Montreal Esperanto Association meets each Tuesday and Thursday at 8.15 P. M. in Room 13, The Tooke Bldg., Sec., Miss E.

Esperanto meetings every Saturday evening at 8 P. M. at 20 Selkirk Ave. ALL are welcome,

### TORONTO, CANADA.

The Toronto Esperanto Club meets every Saturday at 7. P. M. at the Friends' Meeting House, cor. Maitland & Jarvis Sts. Sec., E. M. Gundy, 173 Spadina Road.

#### WASHINGTON, D. C.

La Kabea Esperanta Klubo meets every Wednesday, at 8.30 P. M., at the Thompson School, XIIth and L Sts., N. W.

Kolumbia Esperanto Unuiĝo. Public meeting third Wednesday of each month, 8.30 P. M., XIIth and L Sta., N. W. Free class at 7.30 P. M. every Wednesday, same address.

#### CHICAGO ILLS.

La Gradata Esperanto-Societo, Dvorak Park. Jaroslov Sobehrad, Sec'y. 1116 W. 19th Place.

La Esp. Oficejo. 1669 Blue Island Ave. Kunvenas 2an kaj 4an sab. ĉiumonate.

BOSTON, MASS. Boston Esp. Soc., 507 Pierce Bldg., Copley Sq. Meets Tues., 7 P.M. Miss A. Patten, Sec.

WORCESTER, MASS. Worcester County Esperanto Society. Business Institute, every Friday, 8.00 P.M.

PORTLAND. ME. Portland Esperanto Society. Mrs. E. C. Flint, Sec., 16 Sherman St.

Groups are listed for 12 issues of the magazine, at a cost of only 25 cents for the twoline insertion. Extra lines are 10 cents tach additional. The heading,-name of city or town-is inserted free. This matter warrants the immediate attention of every club secre-Group Charter-\$1.00.

#### DETROIT, MICH.

Detroit Esperanto Office, 507 Breitmeyer Bldg., open daily. Library at disposal of everybody daily, 7 A.M-9P.M., except Tues. and Fri. Classes meet Tues. and Fri., 8.10 P.M.

La Pola Esperanto Asocio, 1507 E. Canfield Ave. B. Lendo, Sek. 3596—29th St.

#### HEBRON, NEBRASKA.

La Hebrona Grupo kunvenas ĉiun ĵaŭdon 8 P.M., 660 Olive Ave., kaj ĉiun Dimanĉon 10 A.M., 500 Olive Ave. Roland Jeffery, Pres., Harry Hogrefe, Vice-Pres.

### HOBOKEN, N. J.

"I.O.O.F. Esperanto Club No. 1 of Greater N.Y." meets every Tuesday at 8.30 P.M. in 61 First St., 3rd Floor West. All welcome. Pres., Mrs. M. O. Haugland; Sec'y Wm. Preusse: Instructor, A. Mendelson. Address all communications to the secretary at above address.

#### NEW YORK CITY, N. Y.

The New York Esperanto Society, Miss L. F. Stoeppler, Sec., 105 West 94th St. The Barco, or Esperanto Supper, is held on the third Friday of each month 6.45 P. M. Information from the Secretary.

La dimanĉa kunveno, al kiu ĉiuj estas bon-venaj, okazas je la tria horo, posttagmese, ĉiun dimanĉon, ĉe la loĝejo de S-ro Joseph Silbernik, 229 East 18th St., Manhattan.

CLEVELAND, OHIO. La Zamenhofa Klubo; S. Kosminaki, Sek., 3406 Meyer Ave.

ERIE, PA. La Pola Studenta Societo, Prof. E. Bobrowski, ing., St. John Kanty College eldonas ½-jaran jurnalon, "La Studento," jara abono \$1.00.

PHILADELPHIA, PA. Phila. Esp. Soc. Miss Marie Knowlan, cor. Sec., 1420 18th St. Meets 4th Fri., Hotel Hanover, 12th and Arch Sts.

Rendeto de Litovaj Esperantistoj, Livingston St.

Esperanta stelo de Polujo.. Sekr., S. Zyak. Kunyenas mardon vespere inter 8-10 h., 507 N. York Ave.

PITTSBURGH, PA.
Esperanto Sec., Academy of Science and Art.
J. D. Hailman, Sec., 310 S. Lang Ave. Fridays, 8 P. M.

MILWAUKEE, WISC. Hesperus Esperantists. S-ino B. H. Kerner, Sek., 629 Summit Av., 3d Tuesdays, 8 P.M. 19

# Amerika Esperantisto

# American Esperantist

# WEST NEWTON 65, MASS.

Entered as second-class matter May 15, 1913, at the Postoffice at West Newton Station, Boston, Mass., under the Act of March 3, 1879.

A true translation of the non-English portion of this magazine filed with the Postmaster, Boston, Mass.

Every article in this magazine (unless expressly excepted) may be translated or reprinted without lurther permission.

One Dollar a Year. Single Copy Ten Cents.
Po Dudek Respond-Kuponoj aŭ Du Spesmiloj (Oraj) Jare.

#### Published Monthly by

### THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA

The Esperanto Office, Pierce Bldg., Copley Sq., Boston, Mass., Usono.

Vol. 28

May, 1921

No. 1

# ESPERANTISTOJ! KLUBANOJ KAJ IZOLULOJ!

Samideanoj! Bonvolu sendi al la Esperanto Asocio de Norda Ameriko statistikon kaj mallongan priskribon pri la progresoj de Esperanto en via urbo aŭ ŝtato dum la nuna kaj pasinta jaroj. Ni urĝe bezonas tiun informon kaj por prezenti al la gazetaro dum nia Kongreso en Bostono, kaj por la raporto de la E. A. N. A. al la Mondkongreso je Praha. Ĉiu Esperantisto en Nordameriko, ĉu aliĝinta aŭ ne kun ia grupo, sendu sian nomon kaj adreson (ne publikigotaj sen permeso) kaj faktojn al li konatajn.

Adresu

Esperanta Asocio de Norda Ameriko, G. W. Lee, Sek., 507 Pierce Bldg., Boston 17, Mass., USONA

### THE RED CROSS URGES ESPERANTO STUDY

The Tenth International Conference of the Red Cross (in Geneva, March 30—April 7) adopted in its plenary session of April 7th the following resolution as proposed by the Chinese delegate, Doctor Wong:

"Considering that the difficulty of the languages in many ways stands in the way of a realization of the international ideal of the Red Cross, whether in the work of succor upon the battlefield, or in that among the prisoners of war, or even at the congresses of the Red Cross:—

The Xth Conference invites every organization in the Red Cross to encourage the learning of the auxiliary language Esperanto, by its members and especially in the junior sections, as one of the most potent means to international accord and collaboration in the sphere of the Red Cross."

The resolution of the Chinese delegate was supported by the delegates of Serbia, Germany, Poland, and Sweden, and adopted.

from Esperanto Triumfonta

# SIGNS OF THE TIMES

# PRINCE OF MONACO DESCRIBES OCEAN'S DEPTHS (extract from the New York Tribune, April 24, 1921)

"It gave us time to put an immense amount of data, collected during decades, into volume form, and we have already printed 54 books on the subject of oceanography which will be valuable to others. They are in French, of course, but most scientists are conversant with that language. However, two scientific societies of which I am a member, have talked over the matter of using the universal language, Esperanto, for scientific works, so that all nationalities of scientists, now forced to read in several languages, may read all research in one."

# INTERVIEW WITH DR. PUPIN

(extract from "American Magazine," May, 1921, p. 172)

The scientist-inventor, world-famous for his work with wireless,

X-rays, and power-transmission, says:


"The world-wide telephone system will lead to the development of some method of talking that will not require the use of the language of either of the speakers. Esperanto might serve the purpose, and it is interesting to observe here that Esperanto has lately come to the foreground and is occupying much more the attention of men."

# PARTOPRENONTOJ EN LA XIIIA

Verŝajne, multaj Esperantistoj deziros viziti Eŭropon tiun jaron kaj samtempe partopreni la XIIIan. Certe ĉiu el ili preferus vojaĝi kune kun aliaj Esperantistoj por ke la vojaĝo fariĝu multe pli agrabla. Ni atendis se iu el la orienta parto de Usono prenus sur si la aranĝon de la karavano al la XIIIa sed ĝis nun neniu kuraĝis, tial La NOVAK & STEJSKAL State Bank, kies prezidanto estas fervora Esperantisto, vidante ke estas necese rapidi, invitas ĉiujn Esperantistojn kiuj deziras viziti Eŭropon tiun jaron ke ili tuj komuniku al la supre nomita banko.

Se nur malmulte partoprenos la sola gajno estos ke ili iros kune. sed en okazo ke pli da personoj partoprenos li estas certa ke li povos gajni por la partoprenontoj rabaton.

Tial čiu kiu intencas partopreni komuniku tuj kun NOVAK & STEJSKAL, State Bank, 1817 S. Loomis St., Chicago, Ill.



Castle Hradcany

# PRAHA, THE CAPITAL OF THE CZECHOSLOVAK REPUBLIC

The city where the XIIIth World Esperantist Congress will be heid July 31st to August 6th is one of the most beautiful cities in the world and distinguished travelers declare it to be one of the most fascinating of all the cities of Europe on account of its unrivalled picturesque location as well as its antique features and the charm of

its grand history.

Praha, which is better known under the name of Prague in the English-speaking world, is the capital of the Czechoslovak Republic and its history blends into the legendary. Libuse, a semi-mythical princess, is said to have founded the Castle of Prague and under her rule the surrounding towns rose and flourished. The Castle, Hrad-cany, was for many centuries the seat of the Premsyl dynasty, extinct in 1306, and now, in the independent Republic, the Castle Hrad-cany is the seat of Czechoslovakia's first president, Thomas G. Masaryk, and also of the government.

The time of wonderful prosperity for Prague was during the reign of Charles the Fourth of the Luxemburg dynasty (1346 to 1378) who made Prague the capital of the Holy Roman Empire. He also founded the famous University, built the Charles Stone Bridge, etc., so that the City of Prague held the foremost position among the seats

of culture and civilization in Europe.

Prague has all of the qualities to charm not only as a mediaeval city but also as one of the most handsome and progressive modern towns in Europe. One of the most important buildings is the Museum of the Kingdom of Bohemia on the upper area of the Vaclavske nametsi. The National Theatre is a very beautiful structure of the Renaissance.

The River Vltava, with its many picturesque islands, running tl:ru the heart of Prague, gives to the city a resemblance to Paris, but the Castle of Hradcany with the Cathedral of St. Vitus, gives to the city an entirely different and original aspect which will never fade from the memories of her visitors.

Prague, with her position in the "Heart of Europe," as Czechoslovakia is called, is certainly a city most suitable for the holding of conventions and congresses. The direct express train from Paris to Prague takes only 30 hours. There is also mail service by airplane between Paris and Prague. About one million people make up the population of Prague.

(We feel it unnecessary to add anything to this account, kindly furnished by the Czechoslovak Press Bureau, owing to the full description in the February number of the National Geographical Mag-

azine, obtainable at most libraries.)

# XIIIa UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

en Praha, Ĉeĥoslovakujo, VII 31.-VIII 6., 1921.

# 6a, 7a, kaj 8a komunikoj (mallongigitaj)

Kotizaĵo—25 frankoj oro (antaŭmilita valoro)=5 dolaroj, 12 nederlandaj guldenoj, 20 ŝilingoj, skandinavaj kronoj, germanaj markoj, 25 frankoj, liroj, dinaroj, leonoj b. r., pesetoj, ĉeĥoslovakaj kronoj, aŭstriaj kaj hungaraj kronoj, polaj kaj finaj markoj. Geesperantistoj el aliaj ŝtatoj pagas 25 frankojn francajn. Pluaj samfamilianoj pagas nur 60% de la kotizaĵo. Post la 1a de Junio altiĝos la kotizaĵo je 50%

Ciu pagas en sia nuna ŝtata valuto! La sumon sendu en rekomendita letero rekte al la ĝenerala sekretario! La ricevo de la kotizo

estos venonte sole en ĉi tiu rubriko kvitota.

Gis nun pagis 8,10-12, 14-20, 26, 31, 36, 40, 43, 44, 54, 61, 65; 103, 114, 117, 121, 126-28, 131, 136-7, 139-49, 151-2, 158-66, 168-9, 171-5, 177-83, 196, 200, 205, 213-33, 235-54, 256, 261-3, 265-84, 287-91, 293-301, 303-09, 312-27, 333-6, 341, 344-5, 347-8, 364-5, 381-90, 391-4, 395-404.

Fakaj kunvenoj—Por filatelistoj—organizas S-ro Fleischer, teosofanoj—S-ro Cimr, ŝakludantoj—S-ro Hajek, kiu aranĝos ankaŭ vetludon de esperantaj ŝakistoj.

Fakan kunvenon por virinoj aranĝos F-ino instruistino Nesmera-

kova: por ĉastemuloj, S-ro Roskes, Hago.

Donacoj Čeĥoslovaka ministerio por eksterlandaj aferoj—5,000 Kĉ., S-ro Heek—60 N. G., S-ino Mammen k. a.—100 Kĉ., S-ro Straka—100 Kĉ., Prof. Krouzil k. a.—60 Kĉ., Anonima Soc.—51 Kĉ., S-ro Ribas de Pina—5 liroj, amuzvespero de Skt. Nikolao, ktp.—7,000 Kĉ., por donacitaj 50 ekzempleroj de Esperanto Triumfonta—62 Kĉ. 67 h.; S-ino Mammen k. sk.—113 Kĉ, S-ro Jung—30Kĉ, S-ro Koŝice—400 Kĉ, Sk. Larsen—3 Kd, S-ro. Riedl—25 Kĉ, S-ro Buenemann—8 M, S-ro Simonek—1,000 Kĉ, S-ro Tutsch—15 K, S-ro Fitton—20 ŝ, Esp. Grupo Olomouc—100 Kĉ., S-ro Tannenbaum—175 A. K., S-ro Gottgetreu—18 M., Kuĉera—100 K., l. de Prof. Krouzil—90 K.

**Aliĝoj**—102—131, 132—179, 180—405.

Pasportoj—Por la veturo al Praha kaj reveno estas necesa pasporto, pretigita de la policestrejo aŭ de alia kompetenta ŝtata ofico, vizita de la Ĉeĥoslovaka ambasadorejo aŭ konsulejo kaj de la konsuloj de ĉiuj traveturotaj ŝtatoj.

Oni intencas prizorgi ankaŭ loĝadon en privataj familioj kaj komunaj loĝejoj (por neriĉaj esperantistoj). Notu viajn tiurilatajn

dezirojn en la de la Kongresa Loka Komitato sendota aliĝilo.

Prezoj de la biletoj por fervojlinioj-

Praha—Sob—Budapest: IIa, 168 KC.—106. KH.; IIIa, 84 KC.—73 KH.

Praha—Cmunt—Wien—Graz: IIa, 84.80 K. C.—183.60 K. A.—248.40 K. A.; IIIa, 42.20 K. C.—19.80 K. A.—124.20 K. A.

Praha—Eger—Kufstein—Brenner—Trento: IIa, 97.60 KC.—110 M. —129.60 KA.—35.80 L.; IIIa, 48.80 KC.—67 M.—64.80 KA.— 18.90 L.

Praha—Spielfeld—Beograd: IIa, 97.20 KC.—399.80 KA.—226.50 D.; IIIa, 48.80 KC.—199.80 KA.—113.25 D.

Spielfeld—Longatico—Trieste: IIa, 79.50 D.—26.45 L.; IIIa, 39.75 D. —14.10 L.

Brenner—Roma: IIa, 137.60 L.; IIIa, 71.30 L. Brenner—Genova: IIa, 106.25 L.; IIIa, 55.20 L.

Praha—Cheb—Appenweier—Basl—Bern: IIa, 179.28 M.—11 F. S.; IIIa, 111.30 M.—7.30 F. S.

Praha-Strassburg-Lyon: IIa, 77 F.-35.80 F.; IIIa, 47 F.-22.75 F.

Praha—Paris: IIa, 381.15 F.; IIIa, 135 F.

Praha—Decin—Aachen—Brussel: IIa, 68.80 KC.—211.20 M.—17 F.; IIIa, 34.40 KC.—126 M.—10 F.

Praha—Decin—Salzbergen—Amsterdam: IIa, 68.80 KC.—172.60 M. —10.40 G.; IIIa, 34.40 KC.—102.40 M.—6.30 G.

Praha—Berlin—Hamburg: IIa, 68.80 KC.—145 M.; IIIa, 34.40 KC. —89 M.

Praha—Boxtel—London: IIa, 68.80 KC.—194.40 M.—37.50 G.; IIIa, 34.40 KC.—115.70 M.—33.20 G.

Praha—Berlin—Rostock—(Kopenhago): IIa, 68.80 KC.—77 M.—54 M.; IIIa, 34.40 KC.—45 M.—31.80 M.

I.ondon—Calais—Strassburg—Cheb—Praha (Orient Express) Ia, 561 F.—14.20 £.

Praha—Sassnitz—Warnemuende—(Stockholm): IIa, 68.80 KC.—87.60 M.—85.20 M.; IIIa, 34.40 KC.—87.60 M.—85.20 M.

Praha—Leipzig—Frankfurt: IIa, 68.80 KC.—50.80 M.—93 M.; IIIa, 34.40 KC.—30.40 M.—55.80 M.

Praha—Strassburg—Paris—Narbonne—Perpignan—(Barcelona): Ia. 77 FF.—71 F.—139.20 F.—8.90 F.; IIIa, 47 F.—45 F.—88.55 F.—5.65 F.

(K.-krone: C.-Czech, H.-Hungarian, A.-Austrian; M.-Marks, G.-Dutch Gulden, &-British Pounds, L.-Lire, D.-Dinars, F.-francs (French?), F. S.-Swiss Franks.

Garantia fundo—entute, 17 garantiuloj, 2,497.13 Kĉ., kaj 500 N. G. Gesamideanoj! Garantiu almenaŭ 100 Kronojn ĉeĥoslovakajn.



General View of Praha

Courtesy of the Czechoslovak Press Bureau

Glumarkoj oficialaj—(3 malsamaj specoj dukoloraj) jus aperis:— 1 peco po 10 heleroj, 100 po 9 (kun afranko—12) kronoj ĉ., por eksterlando—100 pecoj 3 francajn frankojn aŭ egalvaloran valuton sendotan en rekomendita letero. Mendu rapide.

Prezoj (hodiaŭaj) en Praha—de la hotelĉambroj:—I. kategorio—a. unulita—10-37 K.; b. dua provizora lito—10-20 K.; c. dulita—23-77 K. II. kategorio—a. 10-29 K.; b. 10 K.; c. 26-50 K.

Prezoj de la manĝaĵoj:—I. kategorio—a. matenmanĝo (kafo aŭ teo kun butero aŭ kompoto, pano aŭ bulko)—10-15 K; b. tagmanĝo (inter la 12-2 h. posttagmeze) a la carte (buljono, fiŝo aŭ bovaĵo, rostaĵo, kun farunbuloj aŭ terpomoj, farunaĵo)—45-75 K.; c. vespermanĝo a la carte (antaŭmanĝo kaj rostaĵo)—25-65 K.

2. kategorio—a. 5-7 K.; b. 33-37 K.; c. 25 K. Krom tio la trinkmono almenaŭ 10%. En restoracioj bonaj tag-

kaj vespermanĝoj por 10-20 K.!

Tre bongustaj kaj malkaraj estas la kolbasetoj, vurstetoj, kaj ŝinko de Praha. Biero ½—1K. 30h.-2K. 30h.

Korespondado—Gesamideanoj! Legu atente la ĝisnunajn komunikojn! Ne demandu pri la komunikitaĵoj! Ne malriĉigu la kongresan kason forgesante aldoni por respondo aŭ respondkuponon aŭ aldonante afrankon en neuzitaj naciaj poŝtmarkoj! Demandu sole pri aferoj rilatantaj al la XIIIa!

Por la Loka Kongresa Komitato: Augustin Pitlik, ĝen. sek., Praha III, Nerudova 40.

# Partoprenu la Budapesta Postkongreso!

La estraroj de la landa societo kaj laboristaj grupoj, spite siajn ĝisnunajn akrajn politikajn rilatojn, kune laboras por akcepti la kon-

gresanoin de la XIIIa.

La postkongreso ekazos la 9an kaj 10an de aŭgusto tiamaniere, ke la prahaj kongresanoj forveturante dimanĉe el Praha povas post belega ŝipveturo sur la blua Danubo la 8an lunde vespere alveni en Budapest kaj partopreni la konatigan vesperon.

Antaŭtagmeze estos kunsidoj kaj ekskursoj ŝipaj aŭ piedaj, vespere koncerto kaj teatraĵo. Definitiva programo espereble baldaŭ aperos. La laboristaj grupoj aranĝos ankaŭ apartan esp. laboristan

landan kongresen.

Eksterlandaj Samideanoj! Helpu la sukceson de la postkongreso en Budapest! Aliĝu kaj sendu helpmonojn, partoprenu per la programpunkto je la internacia koncerto, vizitu la hungarajn samideanojn.

Adresu al A. Laquer,

Budapest VII, Kiraly u. 57-II, Hungario.

# Bonvenu al Vieno!

La Esperantistaj asocioj en Aŭstrujo sentas la agrablan devon akceli la plenan sukceson de l' solena festo de la tutmonda samideanaro kiu en ĉi tiu jaro estas aranĝata en la ĉefurbo de la najbara Bohemujo. Wien mem, urbo la plej granda en Mezeŭropo, aranĝos nek antaŭ- nek postkongreson, por ke aliaj jam projektataj samspecaj aranĝoj per tio ne estu malhelpataj. Multaj samideanoj certe jam nun decidis veturi al Budapest, Graz, Dresden, aŭ aliloken. Sed estas sendube, ke multaj samideanoj, veturontaj el malproksimaj landoj al la kongreso en Praha, deziras tiuokaze viziti ankaŭ la vidindan kaj gastaman ĉefurbon de Aŭstrujo, la historie faman kaj nun tiel ofte—bedaŭre kun kompato—nomatan Wien—Vieno. Multaj kongresanoj eĉ devige travojaĝos kaj nepre restados ĉi tie.

Precipe la tagoj antaŭ la Universala Kongreso, la 28. k. 29. de Julio, kaj la tagoj post ĝi, la 6.—10a. de Aŭgusto, estos la plej taŭgaj por tiaj vizitoj. La fremdlandaj samideanoj estas do korege invitataj aranĝi siajn vojaĝojn tiamaniere, ke ili povu restadi dum tiuj tagoj en Wien. Kiu volas viziti nian belan hejmlandon estas petata anonci la tagon (ev. horon) de sia alveno kiel eble plej frue, por ke la akcepta komitato povu ĝustatempe zorgi pri enloĝigo. Estas ankaŭ projektata komuna veturado el Wien al Praha, eventuale el Praha al Wien.

Semideanoj, dezirantaj viziti Wien, bonvolu tuj sciigi pri tio la subskribitan estron de la komitato.

Ciuj sin anoncintoj poste ricevos apartan cirkuleron kun pluaj detalaj informoj.

Ĝis revido en Wien!

Por la akcepta komitato de la Esp.-Delegitaro de Wien: Hugo Steinhauer, Wien, II, Boecklinstr. 8. Postkongresa Vojaĝo post la XIIIa

La ligo de germ. Esp.-societoj en Cehoslovakio aranĝos post la XIIIa en Praha postkongresan vojaĝon tra la vidindaj pejzaĝoj kaj urboj de norda Bohemio. La vojaĝo estos agrabla daŭrigo de la kongreso kaj due la partoprenantoj helpos propagandi en tiu regiono.

La vojaĝantoj estos kondukataj tra la ferindustria urbo Plzen, Marienbad (konata banurbo), Eger (malnova historia urbo de Wallenstein, al Franzenbad (banloko kiu starigis la lan Esp. monumenton en la mondo. Veturo al Karlsbad (mondekonata urbo kun belega ĉirkaŭaĵo), ekskurso al Joachimstal (radium-minejoj k. banoj tre interesaj por kuracistoj), Saaz (mk. lupolkomerco), Teplitz (banl.), Leitmeritz (komenco de la ŝipveturado tra la belega Elbe valo ĝis Bodenbach (komerca k. industria centro). Vizito de la IIa internacia Foiro de Reichenberg (13a ĝis 21a de aŭg.). Oficiala postkongreso de la ligo kaj solena finigo de la vojaĝo. Ekskursoj en la belega ĉirkaŭaĵo de Reichenberg.

La vojaĝelspezoj por fervojo k. ŝipo estas 150 Kĉ., ni esperas

ricevi rabaton de la ministerio.

Detaloj pri la vojaĝo aperos en la gazeto, "La Marto." Krom tio estos dissendataj specialaj presaĵoj priskribantaj la tutan vojaĝon.

Aliĝojn bonvolu sendi al-S-ro kapitano Franz Beran,

Leitmeritz, Langestr. 23.

Bonvolu aldoni respondkuponon aŭ naciajn poŝtmarkojn por respondo.

# Universala Internacia Katolika Kongreso 7,-11. Aŭg., 1921, en Graz, Aŭstrujo

Tuj post la fino de la universala kongreso en Praha okazos en Graz, Aŭstrujo, la internacia katolika kongreso. Krom la ĝenerala problemo de la nuntempa internacia agado pritraktota dum la ĝenerala parto de la kongreso oni intencas aranĝi specialajn konferencojn por la diversaj fakoj de la vivo katolika: ekz., por la junula, studenta, virina, laborista, porpaca, esperanta, ktp., movado. La organiza kongreskomitato invitas kore ĉiujn samkredanojn al multenombra partoprenado. Oni sendu aliĝilojn kaj demandojn al la Organiza K. K. Graz, Karmeliterplatz 5, Aŭstrujo.

La propaganda kongreskomitato,

Kaspar Mayr, Sekretario.

Internacia Katolika Porpaca Konferenco 7.—11. Aŭg., 1921, en Graz, Aŭstrujo

Okaze de la universala kongreso katolika en Graz, aranĝata per la Internacio Katolika (Ika) okazos internacia katolika porpaca konferenco por pritrakti la problemon kaj tutmondan organizon de internacia katolika porpaca movado. La prepara komitato starigis tuj internacian komitaton por montri la absolutan politikan neŭtralecon, kiu invitis ĉiujn geamikojn de la katolika porpaca movado al bonvola partoprenado. Ĉiujn informojn donas la organiza kongreskomitato Graz, Karmeliterplatz 5, Aŭstrujo.

Por la prepara komitato de la konserenco:

Sek. de Mondpacligo Kruco Blanka Cefsek. de Ika Kaspar Mayr D. M. Metzger

# Alvoko al la Vizitontoj de la Praga Kongreso!

La urbo de la "Kvara," Dresden, aranĝos INTERNACIAN ANTAŬ-KONGRESON

legg legisitentein de le Drew Vougnes

kaj invitas kore la vizitontojn de la Praga Kongreso. Provizora Programo:

28a de julio—antaŭtagmeze vizito de la vidindaĵoj de la urbo;—tagmeze—komuna tagmanĝo en la "Granda Gardeno";—vespere—publika propaganda kunveno, poste ev. vizito de koncerto.—

29a de J.—antaŭtagmeze—veturado per speciala ŝipo sur Elbe al Pillnitz kaj migrado—vespere—granda festo kun balo internacia—

30 de J.—komuna veturado al Prago per—se eble—speciala vagonaro.

La kongreskotizaĵo estos ankoraŭ komunikota.. Per afabla helpo de la porfremdula asocio kaj de la polica kaj poŝtista Esperanto grupoj estos ĉio bone organizata. Venu multnombre, ni promesas agrablan restadon. Anoncu tuj per poŝtkarto vian partoprenon, ni poste sendos al vi ĉiujn niajn informilojn.

La kongresa komitato: S-ino Prof. Hankel, D-ro Hch. Arnhold,

Karl v. Frenckell.

Adresu ĉion al nia oficejo, Dresden—N, Hauptstrasse 38 W. Ranft, Sekretario.

# POSTKONGRESA VETURO DE ITALUJO

La Esperanta Federacio de Italujo ĉiom eble provas allogi la kongresanojn Prahajn al Italujo. Jen ilia propono:

Aŭg. 11a kaj 12a—kongreso de Italaj Esperantistoj en Trent. Aŭg. 13a—al Rovereto kaj Verona. 14a kaj 15a—en Milano.

Aŭg. 16a—Genoa, kaj al Roma. 17a, 18a, kaj 19a—en Roma.

Aŭg. 20a-al Napoli.

Aug. 21a kaj 22a-vizitoj al Vesuvius, Pompeii, kaj Capri.

Aug. 23a-al Roma kaj Firenze. 24a-en Firenze.

Aŭg. 25a-al Venezzia. 26a-en Venezzia. 27a-al Trieste.

La tuta ekskurzo, inkluzive tri manĝoj ĉiutage (de Milano al Trieste), veturado, biletoj, hoteloj, kostos (Cook) la-klase 1920 lire; 2a-klase 1285 lire. Bonvolu senprokraste sendi du fotografaĵojn viajn kaj planaron al Via Rossari 2, Milan, Italujo.

# COMMITTEE ON EXAMINATIONS

West Philadelphia High School for Boys

Kun plezuro mi vin sciigas ke S-ro E. L. Southwick, Pawtucket, R. I., sukcesis en la Ekzameno por la komenca diplomo; cifero 96; do, li meritas "honorable mention."

Henry W. Hetzel, Committee on Examinations.

# Y. M. C. A. and Y. P. S. C. E.

Members of Y. M. C. A. and C. E. societies! Send a postal Respond Coupon to Mr. Paul Huebner, 56 Reeseberg, Harburg nach Hamburg, Germany, and receive the constitution of the Kristana Esperantista Ligo, reorganized at the Hague last year.

## GEMS OF ESPERANTO LITERATURE

# Finno Bonvenigas Vintron

Estas longa, teda, malpurega kaj malĝoja aŭtuno. Nenia signo pri estonta vintro. Pluvadas, aŭ se ne pluvas, almenaŭ estas nebuie kaj malseke. La nuboj pendas ĉe la supraĵoj de la arboj, kaj la fumo el kamentuboj ŝvebas suben, preskaŭ ĝis la tero. Grize, malvaste, peze kaj malseke! Nenia distraĵo por la okulo, nenia sono por la orelo.

La vetero ne povas esti sen efiko je la homo. La pezo de la malalta ĉielo premas ankaŭ lin. La vigleco rigidiĝas, la gajeco ekkaŭras en la plej profundaj kavaĵoj de la koro. Aŭ ĉu vi aŭdis eĉ unu ektint-

on de rido ekstere? Almenaŭ mi ne.

Tia estadis la tuta aŭtuno. Kaj tial oni atendadis la malvarmon kaj la vintron kvazaŭ—someron. Oni atendadis, ke vento subite ekturniĝu al nordo, blovu en la atmosferon iom da malvarmo el la polusa zono kaj dispelu la nubojn.

Kaj tio ekazis. Ĝi ekkaptis la baskojn de la nuboj, disŝiris ilin sen kompato kaj jetegis la pecojn antaŭ si. Inter la ŝiraĵoj baldaŭ distingiĝis proksime kaj malproksime la montoj kaj la insuloj kaj la

lagoj en distanco.

Ĉiam pliakriĝis la nordvento kaj kreskis ĝis frostiga blovego. La steloj brilis klare kaj flamante, kiel antaŭ neĝfalo, kaj eĉ la norda lumo

flagradis dum kelka tempo.

Sed post tutnokta blovado fariĝis tute trankvile en mateno. La filo de Nordo plenumis sian laboron. Urbano vekiĝis je neordinara bruo sur la strato. Eksaltis el sia lito, kaj sentis fresan malvarmeton en la ĉambro. Rapidis al la fenestro, rulis la kurtenon, kaj tie renkontis ardantan brulon. La tuta ĉielo sudorienta kvazaŭ flagris en flamoj. Je la vitroj de la fenestro froste fiksiĝis akvogutoj, kaj la termometro montris kvin centigradojn sub nulo.

Li vestiĝis kaj rapidis eksteren. Efektive la frostiĝinta tero klakis sub la kalkanumo. Ankaŭ la fumo ne plu ŝvebis malkviete laŭ la tero; kiel blanka, trankvila kolono ĝi altiĝis al la klara ĉielo.

La pezo falis de la ŝultroj de l'homoj. Ili iradis kvazaŭ en novaj vestoj, la paŝo estis elasta, la irado energia. La okuloj brilis klare, kaj sur la vangoj ardis la ruĝo de sano.

Knabetoj jam glitumis ĉe la bordo, sub iliaj piedoj kraketis la

maldika glacio. Tie estis kriado, tumulto kaj gaja petolado.

Posttagmeze la nuboj ree kovris la ĉielon. Kvazaŭ iu aera estaĵo per facila mano sternis delikatajn gazojn tavolon post tavolo antaŭ la suno. De tie komencis malrapide ŝvebadi suben io blanka kaj delikata.

Neĝo falis. Sen blovo, nur kvazaŭ el kribrilo. Mole, aŭdate de neniu, blanka kunfandiĝema mantelo kovris la teron. Kaj la mantelo estis tiel fleksiĝema, ke ĝi sekvis laŭ ĉiu neebenajo. Ĝi restis pendi sur la branĉoj de la arboj kaj fiksiĝis ĉe la frostoj de la fenestroj.

Sub la piedoj io knaris plezurige. Subite aŭdiĝis la tintado de

sonoriletoj, kaj preterpasis ĉevalo kun sledo.

Kaj tiel la malĝoja, teda aŭtuno ŝanĝiĝis en plezuran kaj gajan vintron.

El Juhani Aho tradukis Vilho Setala.

### FOR THE STUDENT

# A Finn's Welcome to Winter

It is a long, tedious, filthy and sorrowful autumn. No sign of the coming winter. It keeps on raining; or if not raining, it is at least foggy and wet. The clouds hang from the tops of the trees, and the smoke from the chimneys swoops down almost to the ground. All is gray, narrow, heavy and wet! No relief for the eye, not a sound for the ear.

The weather cannot but have its effect on man. The weight of the low sky presses also upon him. One's vim loses edge, one's good cheer shrinks into the deepest recess of one's heart. Have you heard a single burst of laughter out of doors? I haven't.

So it has been all autumn. And so people have been looking forward to the cold and the winter as if they were—summer. They have been looking for the wind to veer suddenly northward, blow into the atmosphere some cold from the polar region and dispel the clouds.

And thus it turned out. It seized the skirts of the clouds, tore them up without mercy, and hurled the pieces before it. Between the shreds there soon shone forth a sky serene; even the sun took the floor; and there appeared near and far the outlines of the mountains, and the islands and the lakes in the distance.

Ever sharper and sharper blew the north wind, until it became a freezing hurricane. The stars shone clear and flaming, as before a

snow-fall, and even the aurora kept flashing for a while.

But after a blustery night, it became quite calm in the morning. The son of the North discharged his work. The city man awoke to extraordinary noise on the street. He leapt from his bed, and felt it fresh and cool in the room. He hurried to the window, put up the blind, and met there a glowing fire. The whole southeastern sky was wrapped, as it were, in darting flames. To the window panes were fresh-fixed water drops, and the thermometer showed five centigrades below zero.

He dressed, and hurried outdoors. Actually the frozen earth rang under his heel. And the smoke no longer hovered near the ground;

but like a white, calm pillar it rose toward the clear sky.

The load fell from the shoulders of men. They walked about as if in new clothes; their step was elastic, their movement energetic. Their eyes shone clear, and on their cheeks glowed the blush of health.

Little boys were now skating near the shore, while under their feet crackled the thin ice. There was shouting, tumult and merry

mischief.

In the afternoon the clouds again covered the sky. It was as tho some airy being had with a light hand spread layer after layer of delicate gauzes before the sun. From thence there began to waft slowly

down something white and delicate.

Snow fell. Breathlessly, as if from a sieve. Softly, without sound, a white clinging mantle covered the earth. And the mantle was so flexible that it followed every inequality of the ground. It remained hanging from the branches of the trees, and was fixed to the windowframes.



Under foot something crunched pleasantly. Suddenly was heard the tinkling of little bells, and there passed a horse and sleigh.

And thus the sorrowful, tedious autumn changed to pleasant and

merry winter.

-Translated from the Finnish by a Finn.

These selections are designed mainly to give some small idea of the scope and richness of Esperanto literature. The English translation, while idiomatic, has the single aim of representing as faithfully as possible the Esperanto text. Of course, like every living language, the international has also its untranslatable elements, and only the adept can appreciate their beauty and possibilities in the hands of masters, The appended notes are not meant for beginners, and are critical and literary rather than pedagogical in their nature.

This month's selection is a study in "modern" Esperanto. It is taken from a recent number of Esperanto Finnlando. Our selection contains a number of "neologisms," yet the style remains quite clear and simple. Notice the uniformity in style between the present piece and our December "Gem," written in the first period of the language. In spite of a healthy influx of new words, the structure and mass of Esperanto is the same at all periods, to the extent that anyone who can read the present-day speech can read the earliest piece in the language. Also notice the uniformity of style as between two writers not merely of two different mother tongues, but of two distinct linguistic families (the Swedish author of the December "Gem" being of the Aryan group, while this month's writer hails from the Turanian family).

Again, compare the psychology of both the Swedish and Finnish selections with that of our first "Gem" (Sep. 1919), in which we have a Polish-Siberian view of life and winter. The natural surroundings are similar, but the spirit of the Western European is very different

from that of his quasi-Oriental brother.

Finno: double consonant to distinguish from fino, "end." A pre-

cedent for the doubled letter is found in Ekz. sek. 36 (Anno).

malĝoja: stronger than malgaja. - supraĵoj: supro generally used in this sense (as FK 28), supraĵo meaning "surface," tho possibly the latter meaning is intended also here. - svebi: a new word := flugpendi. - Grize... malseke!: estas, of course, omitted. There are a number of omissions of obvious words in this selection-which is, in fact, a growing characteristic of good style. -distraĵo: distri has two distinct meanings in common use: can you give them? -ek-kaŭras: kaŭri has been lately "officialized": it means "to squat on one's haunches." - kavaĵoj de la koro: Zam. in Marta has kameretoj de la koro. -ektinto de rido: Zam. in Marta speaks of gamo ("a peal") of laughter. -estadis....atendadis: note the use of -ad- thruout this selection. - subite ekturnigu: the ek- is strictly speaking superfluous, since subite means the same thing; but it is doubtless inserted for emphasis. -ekkaptis: on ek- see last note (kapti itself implying "sudden motion"). -la suno ricevis parolvicon: striking

use of a parliamentary phrase. -nordvento: there is a growing tendency in Esperanto to merge into one word a noun and adjective closely connected or frequently used together. - flagradis connotes a darting, flickering flame, as ardantan (below) strictly speaking connotes a steady light. - Eksaltis .... Rapidis: see note on Grize .... malseke! above. -rulis la kurtenon: rulkurtenon is "a blind." -kvin centigradojn sub nulo: 23 deg. above zero, Fahrenheit. -klakis, lit. "gave a dry, short sound" (Kabe). It is interesting in this selection to notice and discriminate the different "sound" words: ektinto, klakis, kraketis, kriado, knaris, tintado, sonoriletoj. —laŭ: an unusual, modern use of this preposition (probably a contraction of the classic laulong de). —glitumis: for "to skate" Zam. uses simple gliti (Ekz. 34). - kraketis: diminutive of kraki, both connoting the sound when something cracks or bursts. -kvazaŭ is here an ADVERB. It may also be a conjunction (as FK 22-28), or a preposition (as Predikanto ch. X). Acc. to Zamenhof (Letero pri la deveno de Esperanto), words in au belong to no particular grammatical category (tho usage has limited most of them to a single part of speech). facila here has the poetic meaning found in line three of La Espero. -sternis: as dist. from etendi, connotes the spreading of something "sheet-like." -tavolon: why accusative? -lau: see note on same word above. restis pendi: one would expect pendanta. -knaris: strictly connotes a disagreeable sound, as from unoiled machinery or a bad pen. Here it="crunched." Kabe in a similar sense uses grinci (Versaĵoj en Prozo 43). -tinti: notice the "jingle" in the very sound of the word. sledo: a new word; in Ekz. 34 glitveturilo, too long for the necessarily frequent use of the filoj de Nordo.

# PRI DIPOMATIA VORTARO

Vidu la Januaran kaj Februaran numerojn.

synchronization apparatus—sinkronigilo. V (d).

aiming apparatus—celaparato: V
(d). Simpla 'celilo' ne suficas,
car tiu vorto estas jam limigita
je 'aparato lokita sur pafilo kaj
ce kiun oni metas okulon por
celi': V.

component part-ero: K.

Inter-Allied-Inter-Ligana: F(d).

Commission of Control—Reg-Komisiono.

one or more—unu aŭ kelkaj, unu aŭ kelke da: (K).

to dismantle-malarmi: G.

to supervise—kontroli: Z, K, B,

building yard-konstruejo.

to undergo sentence-esti punata.

offence (breaking law)—delikto: G, Esp. 'Ofendo' havas sencon alian.

to complete one's sentence-plenumi sian punon.

to trace (find by traces)—spursekvi: V.

to place at one's disposal—disponigi (al): F.

reparation—rebonigo(j).

to hold office-dejori.

eligible for reelection—reelektebla.

not necessarily-ne nepre.

Prize Court-kaperkortumo.

live stock-bestaro.

milch cow-laktobovino.

option (on contract)—liverigrajto, Ordinare simple 'rajto' suficas.

incunabulum—praverko. triptych—triptiko: V. constituent States — konsistigaj Statoj. as the case may be-laŭokaze. negotiable instrument-bilo: V, dependency—dependantajo: (Nom. 21-25). La '-ant-' ŝajnas superflua. multilateral-multflanka. to collide—kolizii: V. white slavery—virinkomerco: R. concert pitch (music)—norma tonalteco. difference of opinion—disopinio. to contest—kontesti: B, Esp. commission (on sale, etc.)-tantiemo: V. to strike a balance—bilanci: V. the Government concerned—la koncerna Registaro: G. at discretion—laŭ arbitro: FK **29**5. **300**. (La Kabe'a difino de arbitro estas kontraŭuzada.) to wind up (business)—likvidi: K. receiver (in bankruptcy)-sindiko: K, V. executory—plenumota. juridical—jura. to become liable upon a negotiable instrument—farigi pagresponda pri bilo. aerodrome—aersipejo. on a footing of equality with egalrajte kun. airworthiness—aertaŭgeco (kp. martaŭgeco). engagement-kontrakto: K (pv). a bounty—subvencio: K, V. for the time being-siatempe: LR No. 43. rates-tarifo: K, V, B. riparian—riverborda.

octroi—urba limimposto: F. in a lump sum—per unufoja pago. valid—leĝforta. (river)—a!flua tributary rivero (Jar.), alfluaĵo, branco. to be in conflict with-konflikti kun. hereinafter—ĉi poste: V. siding (railroad)—flankreloj. vocational-priofica. credentials-rajtigiloj to select—selekti: V. (Sajnas bone havi apartan radiken por la unua el la du sencoj en K.) to conclude (complete)—el:ari. a reasoned statement-motivita (LZ) komuniko. to authenticate-legitimi: K. at most-maksimume: K. ('Pleje' havas sencon alian: vd. FK. 113, 155, 162, 179, 205, 312.) at the earliest practicable moment -kiel praktike plej frue. 'kiel eble plej frue') to think fit-bontrovi: K. the Government in question—la koncerna (G) Registaro. Governing Body-Reg-Korporac-La vorto 'registaro' havas alian akceptitan sencon.) statement in reply—respondkomuniko. of its own motion—propramove: Commission of Enquiry-Enket-Komisiono. panel (law)—taŭgularo. if any—se ekzistas.  $L_{I}$ wage-earner-perlaboranto: (d). coercive—perforta. with a view to—kun la celo. wording-teksto: K, senco 1. to bar (law)—escepti: FK 310-1.

Mallongigoj de fontoj: Z.—Zamenhof; F.K.—Fundamenta Krestomatio; Ekz.—Ekzercaro; K.—Vortaro de Esperanto, de Kabe; F.—Francaj Militdokumentoj en Esperanto; G. samaj de Germanujo; Esp.—la gazeto Esperanto; Jar.—Jarlibro de U. E. A.; V.—Enciklopedia Vortareto, de Verax; R.—La Revuo.

B.—Plena Vortaro, de Boirac; M.—Esperanto-English Dictionary, de Millidge; GM.—Dictionaire Francais-Esperanto, de Grosjean-Maupin; pv.—plivastigo de la senco de-derivajo; LR Lingvaj Respondoj, de Z.; Nom.—Nombroj, de Z.; LZ— Leono Zamenhof; U.V.—Universala Vortaro.

party in interest-interesulo: G.

# ENLANDA KRONIKO

Detroit, Mich.—Funkcias 3 kursoj, 23 studentoj.

San Francisco, Calif.—2 klasoj je la Esperanta Rondo.

Cleveland, Ohio—Novan klason ĉ. 20 instruas S-ro Stanley Kozminski. Erie, Pa.—Klaso de Prof. Eug. Bobrowski, C. E., eldonos numeron de "La Studento" ĉirkaŭ julion unua.

Philadelphia, Pa.—S-ro K. Vidikovski, 2833 Livingstone St., estas nemita delegito por Usono de la Internacia Katolika Asocio.

Portland, Maine-Funkcias unu klaso kun dek partoprenantoj.

Salt Lake City, Utah-Esperanto Rondo estas organizita tie ĉi Marton 1., 1921. Gvidas kurson E. A. Faust, M. D., 503-4 Hooper Bldg.

Weehawken, N. J.-Marton 8an, oni organizis la Hudson County Esperanto Society. Oni nomis prez., J. J. Sussmuth; vic-prez., J. Feurer; reg. sek., F-ino L. Nagel; kor. sek., W. Milewski; kaj kas. Ĝeo. Poropat. Kurso mardon vespere je 123 Parkview Ave. Okazos barĉo ĉirkaŭ la fino de Majo. Sciigoj kaj longaj artikoloj aperas en Hudson Despatch, Hudson Observer, Hudson News, New Jersey Post, ktp. Toronto, Kanado-Esperanto grupo vekiĝas el dummilita dormeto.

Gi enhavas naŭ flueparolantajn Esperantistojn.

Boston, Mass.—Marton, 22an la Bostona klubo gastigis ĉ. 50 anojn de nove fondita ĉiulingva asocio, kiu celas formi Bostonan centron por čiuj lingvaj demandoj kaj rilataj aferoj .

-Aprilon 30an okazis la barĉo kvinsabata. Bedaŭrinde pro la tuttaga pluvego ĉeestis nur naŭ, inter kiuj S-ro Kershaw el Lawrence, Mass., entuziasma propagandisto. Oni diskutis la programon por la venonta kongreso kaj baldaŭ estos sendata al ĉiuj samideanoj .

Philadelphia, Pa.-La klaso ĉe la West Phila. Altlernejo havas 20 konstantajn membrojn. La unua leciono enhavas diskutojn pri la vortoj uzotaj en korespondo kun alilandanoj kaj multaj el la studentoj jam sendis kaj ricevis poŝtkartojn skribitajn. La anoj de komenca klaso estinte devigitaj verki leteretojn al sia instruisto, unu el ili ekkomencis jene: "Vi diris ke mi devos skribi leteron; puto, tie ĉi iras.!"

New Llano, La.-Feb. 27., oni ludis "The Surprises of Sylvia Farm," drameton propagandan de H. W. Fisher, kaj vekis multe da intereso. S-ro Feree donacas libraron esperantan al la ĉi tiea publika biblioteko.

Nashville, Tenn.-Marton 4an, mortis D-ro J. I. D. Hinds, profesoro kaj fakultatestro de Peabody Kolegio, Nashville, kaj Cumberland Universitatoj, mondekonata ĥemiisto, framasono, kaj poligloto. La lastan jaron li studis kaj ellernis Esperanton.

Moundsville, W. Va.-Red. H. M. Scott gajnis premion en la konkurso de la Brita Literatura kaj Debata Societo. Gratulojn!

Worcester, Mass.—U. E. A. delegito Gleason raportis siajn klopodojn pri starigo de usona aŭtomobila filio en Luebeck, Germanujo.

Salt Lake City, Utah—P. P. Christensen, farmist-laborista kandidato por prezidanto usona (1920) ne nur subtenas sed fervore nun lernas Esperanto-n.

## WORLD NEWS OF ESPERANTO

Esperanto has been made an obligatory subject in the schools of the Canton of Geneva, Switzerland.

Esperanto is an official study in the Milan schools, where twenty-

five courses are attended by 1,100 scholars.

The People's Commissaries for Enlightenment (a government bureau) published about the end of January 30,000 copies of Cart and Pagnier's Esperanto text-book for Russians. This, we hope, will help fill the greatest want in Russia. In Kharkov the pupils learned Esperanto by twice writing out their entire text-book, and learned it thoroly, too. (from Esperanto &La Espero.

We have received from Russia late copies of the Petrograd "Espero" and the Kronstadt "Esperanto Movado" (to March, 1921), and can state that Esperanto is flourishing everywhere—Devjatnin active in Petrograd, semi-weekly courses at Communist headquarters, courses at Estonsk University—Moskow backward, but courses for workingmen in Ylansk and Tverstkoj-Amsk, and in the People's Politechnic School. Further courses reported at Odessa; Marinsk, Tomsk prov., 100 p.; Saratov; Samara, at People's University 60 p.; Sizran, in schools 1 and 2 of Repievka; Nizhni-Novgorod, in schools, and for soldiers of Red Army; Riabki; Perm, 200 p.; Penza, telegraphers; Elets; Rtishebo; Simbirsk, 50 p.; Red Army, 4 rondetoj; Orel, 54p.; Bakhmut; Lugansk; Piatigorsk; Krimskaja, Kuban prov., 50 p.; Krasnodar, 86 p. under Evstifeev; Vladikavkaz; Omsk; Krasnojarsk, 50 p.; Tomsk, 200 p.; Archangel, 43 p.; Vitebsk; etc.

There is an active communist organization, "Eski." There seems to be an attempt to register all Esperantists, perhaps for political purposes, which appears to have had some part in the disintegration of the all-Russian movement. At present there is a fair prospect of

renewed consolidation of activities.

(mostly from Feb-Mar. "Esperanto Movado")

#### PRESS MENTION

"Star of the West" for February 7, 1921 (515 Dearborn St., Chicago, Ill.) is largely given up to Esperanto. The leading article, "International Language," is given in both English and Esperanto versions. There is also an interesting account of the Esperanto class of Kazvin, Persia. There are renderings, too, in Arabic and Persian.

An excellent article appeared in the April number of The Builder, a Masonic journal published at Animosa, Ia., page 110, under the caption of THE INTERNATIONAL LANGUAGE AND FREE-

MASONRY.

The Hudson News, Hudson Despatch (April 25), Hudson Observer, and New Jersey Post, have all published considerable articles upon Esperanto and the new classes of the Hudson County Esperanto Society.

### OFFICE NOTES

For propaganda try a combination of our "Teacher's" and "Pilgrim" numbers.

Mr. Payson's forthcoming book, containing two stories, 'Miserere' and 'Thais', was wrongly listed at 35 cents. The price should be \$.50.